


Guozhu:

MALFACILA DEĈIFRADO PRI TANG-POEMOJ

kaŝtaj en la simfonia poemo *Kanto de la Tero*

* Prelude

Printempe 2007, mi, Guozhu, partoprenis la kunlaboron kompili Esperantan version de <*Poemoj de Tang-dinastio*>. Mi vaste tralegis, multe kolektis, kopie tajpis, mem tradukis, ordigis, korektis..., sed por mi la plej turmenta laboro, estas deĉifra reĉinigo de poemoj tradukitaj de Kris Long, transsenditaj de s-ano Shi Chengtai al mi. Miaj unuaj sukcesoj donis al Shi Chengtai misimpreson, opiniante ke mi verŝajne sidas en biblioteko kun maro da necesaj (il)libroj tiel ke la tasko estas facile plenumbla sen kaprompa deĉifrado. Fakte mi sidas nur en mia litĉambro, kun unu komputilo plus interreto. Kiam mi travivis la torturon de reĉinigo, mia penso ŝvebe vagis foren kaj ekmemoris pri simila kozo antaŭ jaroj, kiam mi reĉinigis poemon de Li Bai.



* Enigmo Donita al Ĉinoj

En majo de 1998, ensemblo de germanaj artistoj vizitis al Ĉinio prezenti simfonion. La programero, kiun ili ludis en Pekino, estis <**Kanto de la Tero** (Das Lied von der Erde)>, verkita de la fama komponisto Gustav Mahler (1860-1911) antaŭ 90 jaroj (en 1908). Mezosopranoj, tenoroj kaj gekantistoj kaj orkestro kune prezentis la verkon. Kvankam Gustav Mahler nomis ĝin simfonio, tamen sen vicnumero inter lia serio da simfonioj. La prezentado vekis sensacion, pro du kaŭzoj. Unue, la simfonio laŭdire fontis de ĉinaj poemoj de Tang-dinastio. Due, ĝi postlasis al ĉinoj enigmon de poemoj.

En la sama tago de prezentado, krom ordinaraj spektantoj, en la koncertan halon senbrue venis ankaŭ grupo da ĉinaj poetoj, kulturistoj, specialistoj pri antikva poezio. Interalie ankaŭ iu ŝtata gvidanto de Ĉinio--- siatempa vicpremiero de la Ŝtata Konsilantaro s-ro Li Lanqing. Li ankaŭ estas amanto de poezio. Kiam la prezentado komenciĝis, al Li Lanqing kaj tiuj ĉinaj eruditoj estis transdonita ĉinlingva "Klarigo pri la Muzikpecoj" tradukita el la germana teksto, laŭ kiu la Kanto de la Tero konsistiĝis el ses muzikpecoj:

La unua muzikpeco nomiĝis <**Trista Drinkkanto**>, kun klara indiko ke la aŭtoro estis Li Bai.

La dua muzikpeco nomiĝis <**Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno**>, sen aŭtentika nomo de aŭtoro, nur germanlingva nomo "Tschang Tsi".

La tria muzikpeco nomiĝis <**De la Juneco**>, verkita laŭ germana kaj franca traduko de iu Tang-poemo nomata Glazura Kiosko, kies aŭtoro estis Li Taibai(Li Tai Po).

La kvara muzikpeco nomiĝis <**Belulino**>, aŭtoro Li Bai.

La kvina muzikpeco nomiĝis <**Ebriulo en Printempo**>, aŭtoro Li Bai.

La sesa muzikpeco nomiĝis <**Adiaŭ**> kiu konsistigas la plejparton de la tuta verko.

Laŭ tiu materialo, la eruditoj rapide deĉifris la ĉinan originalon de kvar muzikpecoj.

Kvankam la teksta traduko de la unua muzikpeco legiĝas tre nebula, tamen la eruditoj senhezite asertis ke tio estas de la poemo <**La Kanto de Malĝojo**> de Li Bai, kies esperantigon far Kalocsay oni povas legi en la Poemaro de Li Bai, p.43.

Originalo de la kvara muzikpeco <Belulino> estas la poemo <**Lotusplukantaj Knabinoj**> de Li Bai (Plukas knabinoj lotusojn ĉe Roxi-rivero).

Originalo de la kvina muzikpeco <Ebriulo en Printempo> estas la poemo <**Vekiĝinte el Ebria Dormo en Printempa Tago**> de Li Bai, kies esperantigon far Guozhu oni povas legi en la Poemaro de Li Bai, p.104.

Teksto de la sesa muzikpeco estas kunmetaĵo de du Tang-poemoj, nome, <**Atendi S-ron Ding Da**> de Meng Haoran kaj <**Ĉe Adiaŭo al Amiko**> de Wang Wei.

Tamen, strange, el la sama materialo la eruditoj sukcesis eltiri nenian solvon por la dua kaj tria muzikpecoj.

Ili povis ellegi nur tiom, ke la aŭtoro de la germana teksto de la dua muzikpeco <Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno> havis nomon "Tschang Tsi", kaj la aŭtoro de la germana teksto de la tria muzikpeco <De la juneco> havis nomon Li Tai Po.

Sed ili, la ĉeestantaj specialistoj kaj eruditoj, restis tute senpova al la demandoj pri la originaloj de la du poemoj, kaj kiu finfine estis la aŭtoro de la dua muzikpeco?

Okazis bruado de rondoj de ĉina poezio, kaj la publika opinio komentis jene:

"Ke fremda artisto ellaboris de nia literatura heredaĵo brilan komponaĵon, tio estas fierinda afero por ĉinoj, tamen ni sentas veran embarason ankaŭ pro tio ke, post ĝia cirkulado en preskaŭ cent jaroj, ni mem eĉ ne scipovas pri ĝiaj originalaj fontpoemoj "



Je la finiĝo de la koncerto, vicpremiero s-ro **Li Lanqing** venigis al si s-ron Guo Chen, la ĝeneralan sekretario de la Muzika Komitato de CCTV, mallaŭte sed serioze diris al li: "**Nepre kaj kiel eble plej rapide deĉifri la originalojn de la du Tang-poemoj, luditaj de la germanaj artistoj en siaj muzikpecoj! Nepre!**"

Sed tiu Guo Chen kredeble estas pli fikondutema burokrato ol devkonscia erudito. Li tre lerte sensarĝigis sin per fortransdono de la tasko al alia(j) erudito(j). Ho, malsamaj homoj agas malsamstile, karaj legantoj, lasu nin legi plue.

Tiel do la germana traduko de la teksto de la ses muzikpecoj estis tranonita de Guo Chen al Prof. Zhou Duwen, fama erudito en la rondo de ĉina poezio. Prof. Zhou Duwen funkciis kiel la vicprezidanto de la Ĉina Poezia Asocio, junaĝe li iam studis sub gvido de la majstra poeziisto Xia Chengtao, kaj poste fariĝis unu el la plej kleraj erudiciuloj en la rondo de ĉina poezio. Oni do metis grandan konfidon al Prof. Zhou Duwen, esperante ke li rapide deĉifru la kodon de Tang-poemoj kaŝitan en la <Kanto de la Tero>.

Tamen, la afero ne estas tiel facila ol oni kredas unuamminute. Post zorgema legado de la teksto de la <**Kanto de la Tero**>, Prof. Zhou Duwen trovis ke Mahler donis rimarkon en la notoj, ke la teksto devenis de la germana libro <**La Ĉina Fluto**[Die chinesische Flote]> eldonita de Hans Bethge en 1907. Post kiam li trovis la libron <La Ĉina Fluto>, li trovis la alian rimarkon, ke tiu germana poemplibro estis transtraduko de alia franca <**La Libro de Jado** [Le Livre de Jade]> kies kunaŭtoroj estis franca verkistino Judith Gautier kaj germana verkisto Hans Heilmann. Prof. Zhou Duwen rigardis kerna punkto la aŭtoran nomon de la muzikpeco <**Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno**>. Laŭ prononco, malantaŭ la nomo "Tschang Tsi " povus sin kaŝi pluraj poetoj de Tang-dinastio ĉu **Zhang Ji**(Daŭro), aŭ **Zhang Ji**(Naskiĝloko), aŭ eĉ alia **Qian Qi**(Mono Leviĝo).....Tamen, post foj-refoja traserĉado en la oficiala Kompleta Kolekto de Tang-poemoj kaj en aliaj similaj poemaroj eldonitaj de popolanoj, oni neniel sukcesis trovi konformajn versojn respondantajn al tiuj en la muzikpeco <Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno>.


Prof. Zhou Duwen venis la konfirmo, ke, ĉar tiuj Tang-poemoj jam trairis kompleksan traduk-procezon unue el la ĉina originalo en la francan, due el la franca en la germanan, trie el la teksto en muzikaĵon, tial, por ilia sukcesa deĉifrado, la deĉifranto devas bone posedi ne nur la koncernajn lingvojn (ĉinan, francan, germanan), sed ankaŭ profundan konon pri la ĉina klasika literaturo, franca literaturo, germana literaturo, kaj la klasika

muziko de Eŭropo.

Prof. Zhou Duwen konfesis dirante: "Mi komprenas nur iom pri klasika literaturo, sed mankas al mi sufiĉa kompetenteco pri la germana kaj franca lingvoj."

(Kommento de Guozhu: Admirinda konduto de honesta erudito! Vere multe diferenca ol la ruzema burokrato!)

Post monatoj da peniga serĉado, Prof. Zhou Duwen faris multe da kopiaĵoj de la teksto de <Kanto de la Tero> kaj disdonis al multaj amikoj aŭ kolegoj en la Pekina Universitato, Pekina Normala Universitato kaj Ĉina Poezia Asocio, esperante ke eble iuj helpos aŭ sukcesos plenumi la deĉifradon de la Tang-poemoj, kaŝitaj en la muzikpecoj.



* Peniga serĉado

Prof. Zhou Duwen verŝajne sentis ĉagrenon de tiu "jarcenta enigmo" kun fono de fremdaj lingvoj. Kiam li akceptis intervjuon de ĵurnalisto de la *Komerca Ĵurnalo de Shenzhen*, li eĉ tiel diris: "La enigmo de <Kanto de la Tero> estas Goldbach-konjekto en poezio, kun tre vasta kaj profunda implicoj. Mi estas ne certa ĉu mi mem sukcesos deĉifri la du kaŝitajn Tang-poemojn per mia tre limigita scio."

Prof. Zhou Duwen ankaŭ tiel diris: "<Kanto de la Tero> tre eble fariĝos sfinksaĵo, sfinksaĵo por ĉina nacio. Ĝi povus esti solvata de nia propra generacio, aŭ forlasota al niaj nepoj.....Sed mi firme kredas ke ĝi certe estos solvita, ĉar al nacio ĉiam ne mankas posteuloj."

Jes, forto de unuopa homo estas limigita. Sed forto de kolektivo kaj saĝo de amaso estas senlimaj. Nature ni kredas pri la sincero en parolo de Prof. Zhou Duwen. Tamen ĉu estas iom troiga lia diro nomante la deĉifradon de du Tang-poemoj Goldbach-konjekto? Ĉu

estas iom tro longa atendado ĝis niaj nepoj solvos la enigmon?

Per la kolektiva forto de ĉinoj, nur se kun ebloj servi al sia Patrujo, kial ĉinoj ne povus solvi la enigmon de la Tang-poemoj, eĉ se en fremdlingvaj tradukoj?

La sekvaj agoj estis pravaj, t.e. fari la problemon publika, senkaŝa, travidebla, disvastigi la informon al publiko, por ke pli multaj homoj sciu pri la tasko kaj volontule partoprenu en la solvado de la problemo.

La sekvantaj gravaj progresoj estis jene:

△ 1998-05-29, *La Komerc* *Ĵurnalo de Shenzhen* publikigis artikolon titolitan "Kiu povas deĉifri la kodon de la du Tang-poemoj?". La deveno kaj historio de la kozo, la klopodoj kaj revo de Prof. Zhou Duwen kc vekis publikan interesiĝon en pli granda amplekso. Aperis pli kaj pli multaj volontuloj por tiu deĉifro.

△ 1999-10-21, La semajna kultura felietono de **tagĵurnalo Guangming**(Lumo) publikigis artikolon de **Qin Jin**: "Provsolvoj por la dua kaj tria muzikpecoj de la <Kanto de la Tero> de Mahler", kiu pionire rompis la embarasan silentadon de pli ol unu jaro.

△ Du monatojn post kiam Qin Jin donis sian konkludon, nome, je 1999-12-23, en la sama semajna kultura felietono de **tagĵurnalo Guangming**(Lumo) aperis artikolo kunverkita de du aŭtoroj Ren Yiping kaj Lu Zhenlun: "Malkovro de la mistero en la dua muzikpeco de la <Kanto de la Tero> de Mahler, <Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno> fontis de la poemo de Qian Qi <Longa Nokto en Aŭtuno>".

△ 1999-12-28, **Popola Tagĵurnalo** (eksterlanda eldono, p.7) publikigis artikolon de **Zhou Duwen kaj Hong Yun**: "Mia Diveno por la Malnova Enimo: **Imitaĵo far Judith Gautier**"

△ Tuj poste, ĝuste kiel doni postsekvajn mesaĝon en interreto, s-ro **Qian Renkang**, profesoro de Ŝanhaja Konservatorio, publikigis artikolon, deklarante ke li sukcese deĉifris tiujn duan kaj trian muzikpecojn pli frue jam delonge en 1983.

△ 2000-01-01, **la Semajna Gazeto Legado de Wenhui** publikigis artikolon, detale eksplikante opiniojn de **Prof.Xu Yuan Zhong (X.Y.Z)**.

Inter tiuj partoprenantoj de la diskuto, ne mankas kleruloj ege erudiciaj pri fremdaj lingvoj. Dank' al ilia penado, oni havis pli kaj pli klaran konon pri la fonto-poemoj de la <Kanto de la Tero> . Nun iom koncize pri tio.

1.1908, laŭ libro <**La Ĉina Fluto**[Die chinesische Flote]> Gustav Mahler kreis la verkon <Kanto de la Tero (Das Lied von der Erde)>.

2.<La Ĉina Fluto> estis germana traduko de Tang-poemoj, eldonita en 1907, tradukinto estis **Hans Bethge**. Ĝuste el tiu ĉi libro **Gustav Mahler** elektis 7 poemojn tradukitajn en la germanan lingvon kaj kreis sian verkon <Kanto de la Tero>.

3.<La Ĉina Fluto> estis traduko ne rekte el la ĉina originalo. Fakte, ĝi estis refoja trans-traduko el germanlingva libro <Ĉina Liriko (Chinesische Lyrik)> . En 1905 s-ro **Hans Heilmann** verkis antaŭparolon por la libro <Ĉina Liriko>.

4.Ankaŭ la germana eldono de la <Ĉina Liriko> estis traduko ne rekte el la ĉina originalo. Fakte, ĝi estis refoja trans-traduko el francaj libroj la unua eldono en 1867 de <La Libro de Jado [Le Livre de Jade]> kaj francigo de Tang-poemoj <Poésies del' époques Thang> kaj ceteraj libroj.

5.Aŭtoro de la franca libro <La Libro de Jado> estis **Judith Gautier**(1845-1917) , impresisma poetino en Francio. Ĝi havis du eldonojn, de 1867 kaj 1902, sed sen indiko pri la ĉinaj originaloj de la francigo. Atestoj montris ke inter la referencaj materialoj por la kompilado troviĝis ankaŭ la libro <Poemoj de Tang-dinastio> de **Denys**.

6.<Poemoj de Tang-dinastio> en franca traduko estis farita de franco **Hervey Saint-Denys** (Marquisd' Hervey Saint-Denys 1823-1892) kiu elekte tradukis kaj eldonis la libron en 1862, do, je 5 jaroj pli frue ol la unua eldono de <La Libro de Jado>.

Tiel ni venis al la kono ke ekzistas **du germanaj tradukoj** (<La Ĉina Fluto> de Hans Bethge kaj la <Ĉina Liriko> de Hans Heilmann) kaj **du francaj tradukoj** (<La Libro de Jado> de Judith Gautier kaj la <Poemoj de Tang-dinastio> de Hervey Saint-Denys).

Post zorgema kompara legado, oni trovis ke, inter la du germanaj tradukoj, tiu de la <Ĉina Liriko> de **Hans Heilmann** legiĝas relative pli formala; kaj ke, inter la du francaj tradukoj, tiu de la <Poemoj de Tang-dinastio> de **Hervey Saint-Denys** estas multe pli fidinda.

Inter la du francaj tradukoj, Judith Gautier neniam menciis pri la ĉinaj originaloj de la tradukoj en <La Libro de Jado>, sed atestoj montris ke ŝi certe konsultis la libron <Poemoj de Tang-dinastio> de Hervey Saint-Denys.

<Poemoj de Tang-dinastio> de Hervey Saint-Denys estis kompilita laŭ la 4 subaj ĉinaj eldonoj, t.e.<Kombina Ekspliko pri Tang-poemoj> (eldono en 1726) , <Detala Ekspliko pri Tang-poemoj> eldonita en Qianlong-erao (1736-1795), <Verkoj de Li Tai Po> kaj <Detale Notita Plena Poemaro de Du Fu>.

Tiel, la franca eldono de <Poemoj de Tang-dinastio> de Hervey Saint-Denys alloge okulfrapas per siaj du karakterizaĵoj: unue, ĝi havas **la plej fruan** eldonan tempon (**1862**), kaj due, ĝi **klare indikis pri siaj ĉinaj originaloj**. Sekve, ĝia elstariĝo estas konsekvenca.

* La Dua Muzikpeco

Guozhu pensas kun dubo pri la problemo: Se la ĉinaj eruditoj havas la kapablon rapide kaj trafe respondi per deĉifro de la unua, kvara, kvina kaj sesa el la ses muzikpecoj de la <Kanto de la Tero>, dume el la tuto nur la dua kaj tria muzikpecoj portempe restas solvotaj, tial, ni havas nenian motivon aserti pri la kulpeco aŭ senkapablo flanke certe de

ĉinaj eruditoj. Kial ne pensu inversen: Ĉu ne ekzistas alia probableco, ke la malsukceson de elĉifrado kaŭzus ia mistraduko? Kiu povas garantii ke al la fremdaj tradukintoj neniam okazis ia miso?

Fakte, post peniga kontrolado pri germanaj kaj francaj tradukoj en multaj fremdlingvaj eldonoj de Tang-poemoj, ĉinaj eruditoj elmetis plurajn respondojn pri la ĉinaj originaloj ĉu por la dua kaj ankaŭ por la tria muzikpeco de la <Kanto de la Tero>, kaj ĉiu respondo kun sia rezona argumento. Samtempe, ili ankaŭ eltrovis multajn interesajn anekdotojn pri kiel kaj kiaj mistradukoj de ĉina klasikaĵoj okazis dum ilia marŝo al la Okcidento.

Ni esploru unue la nomon de la aŭtoro de la dua teksto <**Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno**> (Der Einsame im Herbst) . Ĉar ĉe la teksto troviĝis noto kun skribo **Tschang Tsi**. Laŭ tio ni povas konjekti, ke, el famaj poetoj en Tang-dinastio, tiuj, kies nomo havis proksimuman prononcon kiel Tschang Tsi, estis **Zhang Ji**(Naskiĝloko), **Zhang Ji**(Daŭro), **Zhang Qi**(Silkaĵo), **Chang Yi**.....ktp. Kaj, en la germana libro <**La Ĉina Fluto**> troviĝis entute tri poemoj de Tschang Tsi, el kiuj la dua poemo "Fidela Edzino" estas facile rekonebla je la unua rigardo, ke tio estis la poemo Fidela Edzino de Zhang Ji(Naskiĝloko), kies esp-igon far S.J.Zee oni povas legi en la libro <El Ĉina Poezio> p.84. Do, ni povus aserti ke la aŭtoro de la <Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno> devas esti **Zhang Ji(Naskiĝloko)**. Kaj tiu Zhang Ji naskiĝis en 765, mortis en 830 p.K., tio ankaŭ konformas al la noto en <La Ĉina Fluto> ke la aŭtoro vivis ĉ. 800 p.K.

Tamen, post multfoja traserĉado en la oficiala Kompleta Kolekto de Tang-poemoj kaj en aliaj similaj poemaroj eldonitaj de popolanoj, oni malkovris, ke el la dekkelkaj poetoj, kies nomo havis similan prononcon kiel Tschang Tsi, ĉu Zhang Ji(Daŭro), ĉu Zhang Ji(Naskiĝloko) aŭ Qian Qi (Mono Leviĝo), **neniu skribis versojn similajn al tiuj en <Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno>**.

Kaj iuj komencis konjekti, ĉu eble la "Tschang Tsi" aludas ne pri homa nomo, sed pri titolo de verko? Ĉar ĝia prononco similas al "**Chang Si**", do ĉu eble estus laŭprononca traduko de "**Ĉiam Sopirata**"?

Kaj, laŭ gramatiko, la germana prepozicio "von" povas esprimi kaj posedon kaj devenon. Se estas "**von TSCHANG TSI**", oni povas kompreni ke la aŭtoro nomiĝas "**TSCHANG TSI**", samtempe ankaŭ ke tio devenas de "**TSCHANG TSI**". Laŭ tiu lasta kompreno, oni povas legi kiel "adaptita de la poemo **Ĉiam Sopirata**". La eruditoj do tiel plivastigis la amplekson de siaj esplorado kaj serĉado. Rezulte de tio, la deĉifrado por la dua muzikpeco <**Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno**> de la <Kanto de la Tero" kondukis al tri malsamaj konkludoj.

1.**Qin Jin** opinias, ke ĝi devenas de **la 26-a el la 59 antikveskaj poemoj de Li Bai**, nome, "Verdaj lotusoj kreskas ĉe la fonto", kaj de "La Ĉiam Sopirata" de Li Bai (kies esperantigon far prof. S.J.Zee legu en la esperanta eldono de Poemaro de Li Bai(1), p.16.)

2.**Ren Yiping, Lu Zhenlun** ke opinias, ke <**Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno**>

devenas de la poemo "Imite al Antikva Poemo Longa Nokto en Aŭtuno" de Qian Qi. Kaj Qian Renkang, profesoro de Ŝanhaja Konservatorio, elmetis eĉ pli fruan rekordon, ke li sukcesis deĉifri tiun poemon jam en 1983-08-05, kaj lia siatempa korespondaĵo kun Dr.Donald Mitchell, angla specialisto pri muzikaĵoj de Mahler, povas prui kiel atesto.

Homoj kiuj aprobis tiun opinion ankaŭ elmetis tradukon en tri paraleloj de germana traduko, elgermanigo kaj ĉina originalo kiel ateston.

La germana traduko legiĝas kaj diluita (unu verso de originalo iĝis kvar versoj) kaj libera for de la originalo de Qian Qi. Ĉinaj eruditoj tiel komentis pri la stilo ke "nomojn de aŭtoroj povas libere ŝanĝi de A al B, kaj enhavon arbitre aldoni aŭ fortranĉi." Fronte al tia teksto, ke legantoj ne povis trovi la originalon, pri tio finfine kiu devas senti embarason?

3.2000-01-01, la Semajna Gazeto Legado de Wenhui publikigis artikolon, detale eksplikante opiniojn de Prof.Xu Yuan Zhong (X.Y.Z).

Komence de <La Libro de jado>, antaŭ ĉio Prof. Xu Yuang Zhong atentigis al ni pri la aparta stilo de impresismaj poetoj en traduko de poemoj, dirante:

"Kiam impresismaj poetoj tradukis ĉinajn antikvajn poemojn, ili uzas du neordinarajn manierojn: unue, malmunti la vortojn; due, aldoni impresojn kiujn la originalo ne havas. Sen kono pri tiuj du karakteroj, oni malfacile reĉinigus iliajn tradukojn de Tang-poemoj." Kun tia konvinkigo, Prof. Xu Yuan Zhong asertis kun memfido, ke <Soleca Ombro en Malvarma Aŭtuno> ĝuste estis la poemo "Nokta Ankrado ĉe la Acera Ponto" de Zhang Ji(Daŭro)



Zhang Ji (ĉ. 753)

Nokta Ankrado ĉe la Acera Ponto

Luno falas. Korvoj grakas.
Prujno plenas en ĉielo.

Tremas fiŝist-lamp', aceroj.
Trista dormo ĉe rivero.

Venas el la Fridmont-templo
ekster Gusu* tra aero

la noktmeza sonorado
al boat' de pasaĝero.

*Gusu: nuna Suzhou.
— Trad. Guozhu

Ni povas tiel diri, ke ĉinaj eruditoj superplenumis la taskon. Estas granda ĝuo legi la disputon aŭ debaton, turniron de malsamaj akademiaj vidpunktoj. Poste, iliaj brilaj

disertacioj estis kolektitaj en libron <Esploro pri la Kanto de la Tero de Mahler>, eldonitan de **Ŝanhaja Muzika Eldonejo** en majo de 2002.

* **La Tria muzikpeco**

La tria muzikpeco de la <Kanto de la Tero> titoliĝis <De la juneco> (Von der Jugend), kies aŭtoro nomiĝis **Li-Tai-Po**. En la germana <La Ĉina Fluto> kaj la franca <La Libro de Jado>, tiu ĉi poemo havas saman titolon <**Glazura Kiosko**>. Hispana esperantisto Torne Graŭ esperantigis tiun ĉi poemon el la germana, en sep strofojn po tri versoj.

Meze de la malgranda lago ,
estis pavilono konstruita
de verda kaj blanka porcelanoj.

kiel ĝi estis la dorso de tigro
la jada ponto arkigas ĝin
ĝis alveni al la pavilono.

Ene de la dometo, amikoj sidiĝas,
bone vestitaj, ili trinkas, ili parolas
kaj kelkaj ankaŭ verkas poeziaĵojn.

Malantaŭe glitas iliaj silkaj manikoj,
mallongiĝas iliaj silkaj ĉapoj
belaj, malsupreniras sur iliaj nukoj.

Super la kvieteca surfaco
de malgranda lago ĉio estas montrata
en sia fantasta spegulo.

Ĉio aperas renversie
en la pavilono de verda
kaj de blanka porcelanoj.

kiel duonluno estas la ponto,
renversita ĝia arkaĵo. amikoj,
bone vestitaj, ili trinkas, ili parolas.

Tamen, en poemaro de Li Bai neniam kaj nenie troviĝis poemo sub titolo <**Glazura Kiosko**> aŭ <**Ceramika Kiosko**>. Sekve la solvoj, elmetitaj de ĉinaj eruditoj, estas eĉ pli diversaj ol tiuj por la dua muzikpeco. Kaj la sfero de traserĉado ankaŭ plivastiĝis de poemoj de Li Bai ĝis ĉiuj verkaĵoj de Li Bai, nur se la peco iel impliciĝas kun la vortoj "kiosko" kaj "kunsido". Kaj tiel aperis ses malsamaj solvoj.

1. Laŭ opinio de **Qian Renkang**, profesoro de Ŝanhaja Konservatorio, la fonto-poemo por la poemo <De la Juneco> devas esti <**Festeno en Kiosko de Familio Tao**>, kies esp-igo far Guozhu legiĝas jene:

Loĝejo de ermito en strateto---
impona dom' de nobla altrangulo.
Disfloras inter arboj ĉarmaj floroj.
Lageto klaras kvazaŭ fe-spegulo.

Printempo kaŝas sin en verda akvo.
kaj fermas ĉielruĝon pompa halo.
Kiam aŭdiĝas orkestra muziko,
sorĉas eĉ pli ol en la Ora Valo.

2. **Qin Jin** de Tagĵurnalo Guangming(Lumo) kaj Prof. **Liao Fushu** de Centra Konservatorio ambaŭ opiniis, ke la teksto <De la Juneco> devenis de mallonga prozo de Li Bai <Somere Akompane al S-ro Wu kaj Aliaj Eminentuloj festeni en Gusu-kiosko>. La kialoj de Qin Jin venis de komparado inter du verkoj, versa kaj proza. Li trovis la subajn komunajojn:

- 1). Ambaŭ menciis pri kiosko en akvo.
- 2). Ambaŭ menciis pri la konstrua figuro de la kiosko.
- 3). Ambaŭ menciis pri transa ponto.
- 4). Ambaŭ pri kunsido de amikoj en la kiosko.
- 5). Ambaŭ diris pri la luksa vestaĵoj de ĉeestantoj.
- 6). La priskribo pri "satbabili dum drinkado, improvizi versojn por ĝuo" en <De la Juneco>, estis grava parto en la prozo <En Gusu kiosko>.

3. Malsame ol la opinio de Qin Jin, **Xu Yuan Zhong** asertis ke <De la Juneco> devenis el la fama poemo de **Li Bai** <**FREMDLOKE**>:

La bela vin' de Lanling kun sorĉpleno
en jada bovl' je brilo de sukceso.
Se l' mastro nin regalas ĝis ebrio,
ni liberiĝos jam de vag-ĉagreno. (trad. Guozhu)

Prof. Xu Yuan Zhong diris: "S-ro Qian Zhongshu iam parolis, ke la tradukado de ĉinaj antikvaj poemoj far fremduloj similas al palpado al elefanto far blinduloj: ili konceptis kion ili palptuŝis. Tial ni devas serĉi spurojn laŭ tia penso." Tial li opiniis, ke francoj "palptuŝis" la dekstran duonon de la ĉina vorto "sukceso" , do ili francige eldonis "dorson de tigro"; dume germanoj "palptuŝis" la alian duonon, kaj germane eldonis "blankajn tegolojn". Kaj, interese, ili ambaŭ agis kiel "fea drako kun kaŝita vosto en nubaro". Tial tute malaperis la lasta parto de la poemo <FREMDLOKE> en iliaj tradukoj.

4. S-ro **Ren Yiping** kaj **Lu Zhenlun**, membroj de PLA tamen havas la opinion, ke <De la Juneco> devenis de la piednotoj al titolo de la poemo <Belulino Yang> (Tri pecoj, kies

esperantigojn far Guozhu bv. legu je <Poemaro de Li Bai (1)>, p.29~30.)

5.S-ro **Ge Xiaoyin**, profesoro de la ĉinlingva fakultato de Pekina Universitato, rimarkis pri la senbridemo de Judith Gautier en sia tradukado, sekve li elmetis novan vidpunkton, ke poemo de **Bai Juyi** <Ricevinte la poemon donacitan de S-ro Pei> ampleksis la bazan ideon de la tesko <De la Juneco>, kaj li negis la probablecon ke **Judith Gautier mem versis imite al ĉina poeto**.

6.Male, Prof. **Zhou Duwen** aprobas la opinion ke la peco <De la Juneco> ekskluzive estas la imita verko far Judith Gautier laŭ sia kaprico.Li asertis, ke "tio ne estis el la plumo de Li Bai". En iu artikolo, publikigita 1999-12-28 en la eksterlanda eldono de Popola Tagjurnalo, Prof. Zhou Duwen diris grandanime:

"Kiam Judith Gautier komencis francige kompilis <La Libron de Jado>, ŝi aĝis nur iom pli ol 20-jara, la aspiro al ĉina civilizacio kaj juneca romantiko kondukis ŝin al la teksado de sonĝo pri ĉina poezio. Ŝi senbrideme libere flosis en la maro de poezio, entuziasme tradukis kaj kompilis. Ŝi draste forhakis kaj ŝanĝis, eĉ donante nomon de A al B, ekz-e misskribis la nomon Qian Qi(Mono Leviĝo) kiel Zhang Ji(Naskiĝloko), kaj forigis plejparton de la poemo ktp, ktp. Do, tre eble tiu poemo <Glazura Kiosko> ,atribuita al Li Bai, fakte naskiĝis de ŝia kapria imitado. Tia "ruzaĵo far literaturisto" ja estis tute ne rara en la historio ĉu ĉina ĉu alilanda. Do kio estas ankoraŭ nekomprenebla en la imitaĵoj far Gautier-oj? Kvankam per penado ni ne trovis tiun pecon inter la poemoj de Tang-dinastio, tamen kun ĝojo ni trovis varman koron, kun arda amo al Li Bai, al ĉina kulturo, pli pura ol oro, pli kara ol gemoj. Ni alte taksis ĝin vere kara."

kaj Prof Zhou Duwen faris por ĝi ĉinigon. Inspirite de tio, Guozhu ankaŭ faris esperantan interpreton, laŭ sia propra gusto kaj stilo de Li Bai, en okverso. Nature, tiun libai-eskon oni neniam trovos en <Poemoj de Li Bai>:

Malgranda kiosko troviĝas en
lago,
kun blankaj tegoloj kaj muro
glazura.
Pontarko superas je akva spegulo.
Poetoj venas al kunsido plezura.

Pejzaĝoj inversas sur laga surfaco,
kaj domo kaŝiĝas ermite natura.
Brokataj manikoj leviĝas laŭ
ĉanto,
poema deklamo odoras kultura.

(2007-05-31)

